

***João José Santos***

+

# **La Ĝenerala Asembleo**

**unuakta tragedikomedio**



***La Karavelo***

*esperanto-editejo*



### ***João José Santos***

Filologo pri la portugala, latina kaj helena. Instruis esperanton en Portugalio en multaj kursoj. Aŭtoro de la esperanto-lernolibro por portugallingvanoj *Esperanto em 30 horas*. Fondis, direktas, redaktas kaj kompostas la magazinon *La Karavelo*, kie aperas liaj rakontoj, poemoj, tradukoj kaj aliaj verkospecoj. Editis kaj eldonis la verkojn *Rakontoj por ĉiuj aĝoj* (Luiza Carol) kaj *Liberaj tempoj* (Eduardo Novembro).

João José Santos

*La Ĝenerala Asembleo*  
**PROVERBSIO**

---

***João José Santos***

# **La Ĝenerala Asembleo**

**unuakta tragedikomedio**

**44 paĝoj - kolore presita - kuŝea papero - 11,00 € + sendokostoj  
kontakto: [lakaravelo@gmail.com](mailto:lakaravelo@gmail.com)**

© 2010, João José Mendes Quitério dos Santos  
Rua Damasceno Monteiro, 21-B, r/c dto.  
1170-109 Lisboa - Portugal  
Telem.: (+351) 960 131 515  
Tel.: (+351) 218 127 801 - Fax.: (+351) 218 127 801  
lakaravelo@gmail.com - www.lakaravelo.com

<b>titolo:</b> (título)	<i>La Ĝenerala Asembleo</i>
<b>ĝenro:</b> género	dramo - tragedikomedio
<b>aŭtoro:</b> (autor)	João José Santos (Portugalia / Portugal)
<b>eldonejo:</b> (editora)	João José Santos (La Karavelo)
<b>editisto:</b> (editor)	JJS
<b>komposto:</b> (composição)	JJS
<b>kovrilkomposto:</b> (composição da capa)	JJS
<b>fotoj de la kovrilo kaj dorskovrilo:</b> (fotos da capa e contracapa)	JJS
<b>reviziisto:</b> (revisor)	Cindy McKee (Usono / E.U.A.)
<b>prefaco:</b> (prefácio)	Cindy McKee
<b>lingvo:</b> (língua)	esperanto
<b>internacia libro-numero:</b> (isbn)	978-989-96312-3-6
<b>leĝdepona numero:</b> (n.º de depósito legal)	312810/10

**44 paĝoj - kolore presita - kuŝea papero - 11,00 € + sendokostoj**  
**kontakto: [lakaravelo@gmail.com](mailto:lakaravelo@gmail.com)**

**Atenção!**

**Atenton!**

Qualquer semelhança entre esta obra e pessoas ou situações reais é mera coincidência; acerca da qual o autor, a editora e qualquer outra pessoa está isenta de qualquer responsabilidade.

*Iu ajn simileco inter ĉi tiu verko kaj realaj homoj aŭ situacioj estas simpla koincido; pri kiu la aŭtoro, la eldonejo kaj iu ajn tute ne responsas.*

Este livro é editado para amigos, e não tem lucros comerciais. A editora, o editor e o autor agradecem a colaboração de todos os que intervieram de algum modo na sua concepção, por terem disponibilizado gentilmente o seu trabalho, sem receberem compensação monetária, apenas por amor à cultura.

*Ĉi tiu libro estas eldonita por amikoj, kaj ĝi ne havas komercan profiton. La eldonejo, la editisto kaj la aŭtoro dankas la kunlaboron de ĉiuj iel intervenintaj en ĝian ellaboradon, pro la ĝentileco disponigi sian laboron, sen mona kompenso, nur pro amo al kulturo.*

Nenhuma parte deste livro pode ser copiada por qualquer processo, sem o consentimento escrito do detentor dos direitos de autor. Os direitos de autor são protegidos automaticamente pelas leis portuguesas e da União Europeia. O seu desrespeito é crime público, punido por lei.

*Neniun parton de ĉi tiu libro oni rajtas kopii per iu ajn proceso, sen skribita konsento de la aŭtorrajt-posedanto. La aŭtorrajtoj estas protektataj aŭtomate far la portugaliaj kaj la eŭropuniaj leĝoj. Ilia malrespekto estas publika krimo, punenda laŭleĝe.*



*La Karavelo*  
*esperanto-editejo*

**44 paĝoj - kolore presita - kuŝea papero - 11,00 € + sendokostoj**  
**kontakto: [lakaravelo@gmail.com](mailto:lakaravelo@gmail.com)**

**"Ridendo castigat mores."**

*(Per ridoj oni punas la morojn.)*

**Gil Vicente**

(Ĝilo Visento)

portugala dramisto

1466-1536



**Ĝilo Visento**

## Al aktoroj kaj reĝisoroj

*Petu permeson al la aŭtoro de ĉi tiu dramo por surscenigi ĝin. La aŭtoro kunlaboros por faciligi la surscenigadon de la dramo. Tiu kunlaboro okazos per speciala rabato en la aĉeto de la libroj, per surscenigaj kaj dramaj sugestoj kaj ĝenerale per konsiloj por fari la ponton inter la dramo kaj la teatraĵo, se necese. Pro la kosto de la vojaĝoj, eble la aŭtoro ne povos ĉeesti la teatraĵojn, sed eblus komuniki per interreta sistemo. La aŭtoro antaŭvidas la publikigadon de sinsekvaj fotoj de teatraĵo, en dua eldono de ĉi tiu verko. Cele al tio, prenu altkvalitajn fotojn pri la rolado.*

## La putrigo de la ekskluziveco

### (prefaco)

Marko de kapabla verkisto estas la saĝo permesi, ke la okazoj disvolviĝu ene de verko, sen tro da artifiko. Tiel organiziĝas ĉi tiu teatraĵo.

La verkisto donas lokon al la voĉoj de la roluloj, elmetante al nia rigardo nudigitajn signifojn de la pensoj. Kompreneble, kiel ĝenerale okazas en teatraĵo, li paŝas malantaŭen kaj rifuzas interveni.

Santos rezistis la tenton spritigi la figurojn, malgraŭ la subĝenro: tragedikomedio. Ili estas tiaj, kiaj ili estas: ne blindige brilaj homoj. Ili parolas, agas, hezitas, eĉ kelkfoje iom balbutas. Ili estas homoj kiuj oftas en ĉiuj asocioj; homoj kun kiuj ni interagas. Eble ili estas ni. Se jes, ni bezonas agnoski tiun fakton, ĉar tiaokaze ni tre memkontente okupiĝas pri perfido de Esperanto, pri perfido de niaj propraj deziroj en la diversaj agadoj kaj movadoj de niaj vivoj. Sub lumo de malkomforta spoto, mi kontrolas mian enan Najlon Kanajlon por vidi, ĉu mi mem emas akcepti nur la novajn esperantistojn, kiuj montru la ĝustajn kvalifikojn, laŭ miaj postuloj.

La rolpersono Najlo Kanajlo estas ekskluzivema: komencantoj ne estas bonvenaj; novuloj devus efektive kandidatiĝi kaj pruvi, ke ili posedas deziratajn kvalifikojn. Mi rekontrolas la tekston. Ho! La aŭtoro uzis la vorton "elitismo". Ĝi estas samfamilia de "ekskluziveco"; ĉu ne? Ni demandu nin, ĉu vere ni volas partopreni en tute fermita rondo, eĉ farante necesajn paŝojn por certigi daŭran fermecon...

Publika diskuto en la esperanto-asocio de ĉi tiu dramo ne



estas bonvena. Niaj asocioj eble estas serenaj surface, kaj ni emas neniam agnoski, ke trankvila stagnado kondukas al ŝimo. Ni timas freŝan enfluan, ĉar tiuj envenantaj ondoj portas la nepran haoson de ŝanĝo.

Ĉi tiu verkaĵa enfluaĵo ridetigis min pro la miskonduto evidenta en la roloj, kaj do ĝi samtempe pensigis min pri senagado. Mi konstante pensis pri la falseco de tiu vorto "putriĝo". Kiel pasiva ĝi ŝajnas! Ĉu vi scias, kio vere okazas? Nia pasiveco aktive putrigas. Sufiĉas sidi kaj fari nenion por putrigi organizaĵon. Ofte oni ja faras nenion, krom se brila intelektulo subite prezentas sin sur la sojlo. Tiam, ni hastas al la pordo, enlasas lin aŭ ŝin kaj elsendas anoncojn de nia sukcesa allogo de brilulo... memkontente.

Pri la aranĝo, kiel reĝisoro reagas al *La ĝenerala asembleo*? Kiel li aŭ ŝi surscenigus ĉi tion? Ĉu nur bazite sur la didaskalioj? Mi povas konstati, ke la elasteco de la aranĝo ebligas variajn interpretojn, por emfazi apartan figuron aŭ momenton. Sufiĉas kelkaj detaloj por konstrui scenojn bezonante malmultajn rekvizitojn. Elektoj de aktoroj povas esti diversaj. Aĝo estas la sola fizika trajto kiu estas klare difinita. Aliaj priskriboj kaj nomoj impresas la leganton kaj la spektanton – Johano Banano estas mola kaj malagema. Multaj personoj el loka grupo povas roli. La elektoj estus senproblemaj. Do... nenia ekskluziveco.

Antaŭen, karaj. Ni ne nur akceptu ĉiujn, kiuj emas veni: ni emigu ilin veni. Ni akceptu malkomfortajn kritikojn kaj ŝanĝojn kaj eĉ bonvenigu ilin. Ili, kune kun la novuloj kaj komencantoj, plifortigas kaj plibonigas nin.

Ni neniam putriĝu... ni neniam putrigu.

*Cindy McKee*

# La Ĝenerala Asembleo

(tragedikomedio)

João José Santos

## Scenaj indikoj (kaj ne nur)

*La scenejo devas ŝajni ĉambrego de esperanto-asocio, kie okazas la ĝeneralaj asembleoj.*

*La lumo estu abunda, sen specialaj efikoj, tiel ke oni klare spektu la movojn de la rolpersonoj.*

*Sur la scenejo videblas granda rektangula tablo, kiu montras unu el siaj plej grandaj lateroj al la publiko <sup>1</sup>. Tiu latero estas senhoma, por ke la publiko komforte spektu la agojn kaj movojn de la rolpersonoj, kiuj plenigas la aliajn tri*

---

1 Ĉi tiu estas la plej simpla maniero ordigi la rolpersonojn sur la scenejo. Estas prezentataj ĉi tie aliaj du eblecoj, malpli simplaj, sed kiuj povas esti plaĉaj al kelkaj reĝisoroj kaj adapteblaj al kelkaj spacoj:

**Dua ebleco:** En spacoj, kies scenejo situu kvazaŭ en fundo de puto, kaj la spektantoj ĉirkaŭas ĝin en plano supera al la scenejo, la rolpersonoj povas sidiĝi ĉe la kvar lateroj de la tablo.

**Tria ebleco:** En normala salono kun improvizita scenejo, aŭ en ordinara teatrejo. Oni konstruu specialan tablon, kies kruroj estu malegalaj laŭ la alteco, por ke ĝi, pro sia tordeco, turnu la surfacon al la publiko, tiel profundigante la perspektivon. Ankaŭ la seĝoj povas esti preparitaj por tiu efiko. Nur spertaj reĝisoroj adoptu ĉi tian teknikon. La tordeco devas aperigi kiel rezulton laŭŝajne normalan tablon. La spektanto ne devas senti, ke sur la scenejo la tablo kaj la seĝoj estas torditaj. Oni deziras, ke la scenejo aperu realisma. Aplikata ĉi tiu tekniko, la kvar lateroj de la tablo estos okupataj de la rolpersonoj.

*laterojn. La pozicio kaj movoj de la korpoj estu tiaj, ke la publiko povu kompreni la korpajn kaj vizaĝajn esprimojn, sed samtempe la rolpersonoj devas interagi unu kun la aliaj.*

*Ili intervenas kun seriozaj vizaĝoj, nur kelkfoje minacaj, kaj starigas siajn argumentojn. La etoso estu tiu de ĝenerala asembleo, kie la homoj atendas iun konflikton, do iom streĉa.*

*La homoj ne ridas. Nur kelkfoje ili afable ridetas unu al la aliaj, sed ne tre. La spontana ridado de la publiko devas naskiĝi el la situacioj, kiuj estas tragedi-komediaj. La publiko ridu pro la stulteco de la ideoj kaj konceptoj, ne pro pajacaj situacioj. La verko estas tragedikomedio, ĉar la riddeziro naskiĝas el seriozaĵo: grava opozicio inter du priesperantaj idearoj, unu esperantomortiga kaj alia esperantoprogresa.*

*En ĉi tiu dramo, la homoj prezentiĝas kun eco-nomoj laŭ siaj emoj kaj valoroj. La virtoj kaj malvirtoj aperas sen memkritiko, sen memkribo, kvazaŭ la rolpersonoj ne havus superegon, kiu policus ilian rilaton kun la aliaj homoj. La verko prezentiĝas kun odoro je alegorio.*

## Personoj de la dramo

Prezidanto de la ĝenerala asembleo kaj proponanto:

(Esperantisto tre agema, verkisto, tradukisto, instruisto, kiu volas porti esperanton ĉien.)

Artemo Laboremo

Sekretariino de la ĝenerala asembleo:

(Afabla sinjorino.)

Mario Simpatio

Olda instruisto:

(Maljuna esperantisto, kiu verkis kaj instruis esperanton, kaj plu gvidas esperanto-kurson por la amikoj.)

Moŝto

Maljuna esperantisto:

(Li apenaŭ rolas. Ne parolas. Sidas diskrete kaj videble subtenas la ideojn de Artemo.)

Georgo

Malsana sinjorino:

(Afabla sinjorino, kiu bedaŭrinde perdis mensan stabilecon. Ŝi amike simpatias al Artemo.)

Tango Kanto

Sekretario de la estraro:

(Elitisma homo, por kiu esperanto estas propraĵo de nerduloj <sup>2</sup>.)

Najlo Kanajlo

11-jaraĝa knabino:

(Filino de Najlo Kanajlo. Ŝi bone kondutas. Sidas desegnante sur paperoj ne atentante la aferojn

Saro

---

<sup>2</sup> nerda: oni diras pri nenormalulo, inteligenta sed malsociema, kiu ofte sin dediĉas fanatike nur al unu aŭ malmultaj aferoj.

ĉirkaŭ si.)

Prezidanto de la estraro:

(Tro mola kaj malagema homo por la estrado de asocio. Li sin lasas manovri de Najlo Kanajlo.)

Johano Banano

Libroservisto de la asocio:

(Libroservisto. Li intervenas en la kunsido laŭ senseca maniero.)

Emilio Papilio

Amiko de Artemo:

(Patreca rilate Artemon, preskaŭ fuŝis la planon de la amiko per sia propra perfida plano.)

Kuzo Konfuzo

Nova esperantisto:

(Li apenaŭ rolas. Ne parolas. Ĉion atente aŭskultas.)

Arbo

Edzo de la malsana sinjorino:

(Li apenaŭ rolas. Ne parolas sed aŭskultas. Li zorgas, ke la edzino ne konduku laŭ honta maniero.)

Mevo Revo

## **Ununura Akto**

### **1-a sceno**

*(La ĉeestantoj de la Ĝenerala Asembleo eniras la salonon iom post iom. Kelkaj ordinare interbabilas, aliaj silentas. Post kiam ĉiuj sidas, la Prezidanto de la estraro, Johano Banano, ekparolas.)*

#### **Johano Banano**

Bonan tagon! Jam estas la tria horo. Ni devas komenci nian kunsidon. Kiu volas prezidi ĝin?

*(Estiĝas iom peza silento. Kelkaj rigardas unu la aliajn.)*

(...)

## 5-a sceno

(...)

### Artemo Laboremo

Jes, jes, sinjorino Tango Kanto. Nun vi povas kanti!

*(La malsana afabla sinjorino Tango Kanto infanece kantas, ne tre laŭte, ĝis la fino de la dramo.)*

*(Per forta voĉo, moraliga, finvenka kaj kuraĝiga.)*

Kaj tiel, samideanoj, ni grave avancis por la ŝanĝo de Putra Esperanto-Asocio. Espereble ĉi tiu balotado influos ĝian aliigon al Pure Esperanta Asocio.

*(Samtone sed eĉ pli aplombe kaj triumfe.)*

Ni lernu... ke Kuzo Konfuzo mallojale balotis malfavore al sia amiko kaj al siaj propraj ideoj!

Ni lernu... ke Najlo Kanajlo volis, ke 11-jaraĝa knabino balotu favore al la malinstruado de esperanto!

Ni lernu... ke finfine venkis la klopodoj de nia Moŝto, de mi mem, de la maljunaj pacaj batalantoj kaj de Tango Kanto, kies mensa nestabileco estas pli klera kaj esperantisteca ol la regantoj de Putrejo!

Ni lernu... amikoj... ni lernu, ellernu kaj instruu esperanton!  
*(La kvin propon-favorantoj, kun afablaj kaj ĝojaj mienoj, kantas la kanton komencitan de Tango Kanto, kiu videble tre feliĉas. Kuzo Konfuzo stulte gapas antaŭ ĉio. La aliaj tri malfavorantoj rigardas la tablon videble koleraĵ. La du sindetenintoj neŭtrale spektas ĉion.)*

*(Falas la kurteno.)*

**FINO**